

Enketo de la ŝtato Neuchâtel pri la bezonoj de la junularo, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 535, 1974.01.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Oni multe parolas pri la junularo. Sed ĉu oni bone konas ĝin ? Ni raportis pri la organizo de grava enketo, kiu tuŝis en 1971 sep procentojn de la junularo 16-20-jaraĝa de la kantono Neuchâtel. La proporcio de la demanditoj respegulas la ĝeneralan socian situacion de la samaĝa junularo, el tio la valoro de tiu enketo, kiun gvidis sociologo kaj statistikisto, kiun subvenciis la Registaro kaj kiu ricevis la kunlaboron de multaj organizaĵoj, inter kiuj junularaj societoj.

A.- Laŭ la rezultoj de tiu enketo ni priskribos hodiaŭ la sintenon de la neŭŝatelaj gejunuloj rilate al la **estonta profesia vivo kaj al la nunaj studoj kaj metilernado**.

Cl.- Estas interese konstati, ke 3 gejunuloj je 4 deklaras, ke ili tute libere elektis la profesian vojon. Ili amase neas ĉian eksteran influon, ĉu de la gepatroj, ĉu de la modo aŭ ĉu de la socia medio. Ĉu tio ekpruvas, ke oni atingis veran demokratiigon en la studoj ?

A.- Koncerne al la elekto de la profesia vojo 75 procentoj de la gejunuloj sin deklaras kontentaj aŭ sufiĉe kontentaj de sia elekto, 5 procentoj estas nekontentaj.

Cl.- Sed malgraŭ tiu kontenteco nur 10 procentoj antaŭvidas tujan ekoficiigon en la elektita profesio post la fino de la stud-periodo. 60 procentoj ŝatus unue vojaĝi aŭ daŭrigi la studojn por perfektigi. Ŝajnas, ke la neŭŝatelaj gejunuloj ne sentas la bezonon tuj mem pergajni la vivon. Ili ŝatus povi unue profiti pri la vivo sen necese mem gajni.

A.- Koncerne al la instru-programoj kaj instru-kapabloj de la instruistoj la meti-lernantoj kaj la studentoj en sia granda plimulto sin deklaras kontentaj de la nuna situacio. Nur la ferioj ŝajnas nekontentigaj al la metilernantoj, kiuj estas malpli privilegiitaj, ol la studentoj.

Cl.- Ankaŭ rilate al la antaŭviditaj estontaj profesioj ne esprimiĝas multe da kritikoj, sed pri la ferioj la gejunuloj kun unuanimeco opinias, ke po 5 semajnoj jare estas atingenda normo.

A.- La metilernantoj, kiuj estis petataj esprimi vidpunktojn rilate al la sindikata vivo, donis respondojn, kiuj atestas, ke la sindikatoj devus pli atenti la informadon de la junularo. 2 trionoj de la metilernantoj nenion scias pri la sindikata vivo, nur 15 procentoj antaŭvidas aliĝon al sindikato, kaj nur 5 procentoj opinias, ke la sindikatoj havas ian utilecon por la profesia vivo.

Cl.- La studentoj montras sin malpli realismaj, ol la metilernantoj, kiam oni informiĝas pri la faktoj koncerne al la profesia kaj estonta vivo. La plimulto el ili ŝatus povi daŭrigi ĝeneralajn studojn kiel eble plej longe. Ili celadas antaŭ ĉio al firmigo de sufiĉe vasta kultura kaj scienca informado kaj al evito de tro rapida fakiĝo. Pro tio ilia seninteresiĝo pri la profesiaj realaĵoj. Ili ĝenerale ne scias, en kiu fako ili fine laboros.

A.- Tiu deziro al ĝenerala kulturo ankaŭ esprimiĝas ĉe la metilernantoj. La solaj veraj kritikoj formulitaj rilate al la lern-programoj direktiĝas al la peto de pli da ĝenerala kulturo kaj pli intensiva instruado de la fremdaj lingvoj, pli da sporto.

Cl.- La studentoj, kiuj sin deklaras kontentaj kun la instru-programoj, instru-kapabloj de la instruistoj, respektiva graveco de la instrufakoj, instrumentadoj, rilatoj instruistoj-gelernantoj, kritikas la lernejajn regularojn kaj opinias, ke la hobiaj eblecoj estas mankaj. En tiu kritiko oni rimarkas grandan diferencon inter la knaboj kaj la knabinoj. Nur 30 procentoj de la knaboj sin deklaras kontentaj kun la lernejaj regularoj, dum 55 procentoj de la knabinoj estas kontentaj.

A.- Ekzistas diferenco inter la studentoj kaj la metilernantoj rilate al la kritikemo. Ĉe la metilernantoj la kritikemo kreskas kun la aĝo, verŝajne ĉar tiuj gejunuloj alfrontas profesiajn realaĵojn, kiuj ne ĉiam estas tre plaĉaj. Kontraŭe ĉe la gestudentoj la kritikemo restas sufiĉe abstrakta kaj konstante samnivela.

Cl.- Ĉiuj demandoj, kiuj rilatis al ne tujaj problemoj, metis la metilernantojn kaj studentojn en grandan embarason. Unu tipa demando estis : Kian salajron vi ŝatus atingi, kiam vi estos 35-jaraĝa, konsiderante, ke la mono ne senvaloriĝos. En la donitaj respondoj oni rimarkas, ke la demanditoj neniam pensis al tiaj problemoj. Tamen montriĝas, ke la knaboj havas pli altan celadon, ol la knabinoj, kiuj eble opinias, ke tiam edzo alportos la veran gravan parton de la salajro. La meza normo estas po 2'000 svisaj frankoj monate. Rimarkinde, ke la knaba normo estas 2'330 frankoj, dum la knabina normo 1'630 frankoj. Inter tiuj du normoj estas diferenco de 700 frankoj, kio estas granda sumo.

A.- La gejunuloj preskaŭ unuanime opinias, ke devas ekzisti salajraj diferencoj en rilato kun la profesia formado kaj respondecoj. Ili dubas, ke oni povas fiksi la salajrojn laŭ la produkto-forto. Kaj ankaŭ je granda plimulto la gejunuloj estas, por ke la laboristoj partoprenu la profitojn de la entrepreno, por ke ili estu informataj de la marŝado de la koncerna entrepreno, kaj ke ili ricevu la rajton decidi pri la organizo de la laboro. Preskaŭ unuanime la gejunuloj esprimas la vidpunkton, ke la laboristoj devas havi decidrajton en la fabriko aŭ entrepreno, kie ili laboras.

Cl.- La venontan semajnon, sur la bazo de la sama enketo pri la junularo en la kantono Neuchâtel, ni vidos, kio estas la sinteno de la junuloj rilate al la hobiaj kaj kulturo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!